



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj - ESPERANTO-NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

GEAMIKOJ RENKONTIGIS EN JULLOUVILLE

Ĉirkaŭ 50 geamikoj partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de normandaj esperantistoj organizitan de Christian Levesque. Li trovis taŭgan lokon kaj ĉiuj estis kontentaj pri la organizado: dormĉambroj estis komfortaj kaj manĝaĵoj bongustaj. La feriejo situis meze de granda parko, inter kamparo kaj maro.

Pro proksimeco de Bretonio, ĉeestis kelkaj Bretonoj. Inter ili estis Zef Jégard kiu prelegis pri siaj biciklaj vojaĝoj tra la mondo al lago Baikal dum jaro 2000, de Islamabad ĝis Vladivostok en 2001. Li montris al ni belegajn diapozitivojn kaj respondis al multaj demandoj. Li havis multajn kontaktojn kun aziaj esperantistoj.

Sabate tagmeze kaj posttagmeze trideko da kuraĝuloj nudpiede trairis la golfeton de monto Sankta Miĥaelo 14 kilometroj ire kaj revene kun klarigoj de oficiala gvidisto. Por mi, tiu promonado ne estis laciga. Bedaŭrinde, la vetero malbeliĝis kaj pluvis. Ni ripozis en la Monto dum apenaŭ unu horo, trinkante varman ĉokolado aŭ teon kaj iom sekigante niajn vestojn antaŭ la reveno. Malgraŭ pluvo, ĉiuj estis kontentaj kaj deziremaj rekomenci ... kun suna vetero ! Tiuj kiuj ne partoprenis la marŝadon vizitis Granville.

Dimanĉe matene, ni kunvenis por diskuti pri la problemoj de nia esperantista asocio. Multaj partoprenintoj estis novuloj de nia asocio kaj de Esperanto-movado ĝenerale. Ni provis klarigi la celojn de la diversaj asocioj sed pro manko da tempo, nia diskuto estis iom konfuza. La deziro de ĉeestantoj estas daŭrigo de unueco en nia normanda unuiĝo. La Morala raporto de la Prezidanto Yves NICOLAS estis akceptita. La raportoj de la kasisto kaj de la bultenisto Petro KIJO ankaŭ. Pri la bulteno, la ĉeestantoj opiniis ke ĝi estas libera tribuno; do ĉiu respondecas pri sia artikolo kiu kelkfoje povas rilati al "tiklaj" problemoj.

Vi ricevos tiun bultenon komence de Julio kiu estas feria monato. Sendube, multaj el vi preparas vojaĝon. Mi esperas ke vi havos okazon praktiki Esperanton dum viaj ferioj, akceptante aŭ vizitante korespondantojn, partoprenante kongresojn aŭ aliajn aranĝojn.

Do, Bonajn Feriejn al ĉiuj

Petro KIJO

LA KASISTO ALVOKAS VIN

Dum nia kunveno en Jullouville, estis decidate ke la abon-kotizo por 2003 estas : **8 Eŭroj.**

ATTENTION: Ceux qui n'auront réglé ni 2002 ni 2003 seront rayés de notre fichier et ne recevront plus Normanda Bulteno.

Veuillez contrôler ci -dessous votre situation:

LISTE DES ADHERENTS QUI ONT REGLE LEUR ABONNEMENT 2002:

Gesinjoroj Bachimont, Bataille, Bessière, Boudet, Canu, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Defrance, Demmer, Dolard, Domingo, Dubois, Duflo, Dufossé, Dufresne, Esp-Cotentin, Erhard, Evrard, Frelon, Gibaux, Gibert, Guérault, Guerre, Guilmet, Haulard, Helbert, Hubert, Huet, Jourdain M.L., Jourdain D, Jouvin, Lamy, Langanay, Lebrun, Lecouvreur, Legros, Leguillon-Decosse, Lehericey, Lemarchand, Leménager, Lévesque, Leroy, Lesueur, Lévy, Loisel, Longuet, Loupiac, Magerel, Marie F, Mary P, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paris, Paumier, Pillet, Pottier, Quillaud, Rauch, Robiolle, Rolland, Rousseau, Séry, Tailpied, Tanguy, Touileb, Turmel, Zilliox

LISTE DES ADHERENTS QUI ONT REGLE LEUR ABONNEMENT 2003 :

Gesinjoroj: Bataille, Bessière, Blactot, Bonnet, Canu, Caron, Chalm, Colombel, Defrance, Dufresne, Dolard, Dubois, Dufossé, Esp-Cotentin, Guérault, Guerre, Guilmet, Haulard, Helbert, Hubert, Huet, Langanay, Lemarchand, Leroy, Lesueur, Lévesque, Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Mary P, Michaud, Morio, Moyon, Nardin, Nicolas, Paumier, Pottier, Poupinet, Quillaud, Rauch, Robiolle, Rolland, Rousseau, Séry, Tailpied, Tiercé, Touileb, Turmel, Zilliox

NORMANDA BULTENO

Notre bulletin est tiré à 120 Exemplaires

22 sont envoyés à d'autres associations espérantistes: Esperanto Muzeo en Gray, UEA en Rotterdam, Internacia Esperanto Muzeo en Wien, UFE, JEFO, Fédération Espérantiste du Travail, Naturamikoj, SAT Amikaro, Grésillon, La Chaux de Fonds, les groupes jumelés de Basse-Saxe, les fédérations régionales d'Esperanto-France qui en échange envoient leur propre bulletin.

98 sont envoyés aux individuels. Certains sont envoyés gratuitement à des personnes dont on m'a communiqué l'adresse: nouveaux élèves, adhérents d'autres associations demeurant en Normandie : si après avoir reçu gratuitement 2 ou 3 numéros, ils ne se manifestent pas, l'envoi du bulletin est arrêté.

Actuellement, le bulletin est envoyé dans le Calvados à 21 personnes, dans l'Eure à 8 personnes, dans la Manche à 9 personnes, dans l'Orne à 2 personnes, dans la Seine Maritime à 46 personnes, 12 en dehors de la Normandie

Le nombre de cotisants décroît: 1999 : 93 abonnés, 2000: 89 abonnés, 2001 : 92 abonnés, 2002 : 72 abonnés

NIAJ GRUPOJ:

LE HAVRE: Nous avons reçu de Chine 3 bulletins concernant les villes jumelées; il semble que l'on peut y trouver des sujets pour notre bulteno. Notre ami B.Blactot suggère que comme sujet de correspondance nous choissions la promotion de l'Esperanto

Nos expériences récentes en la matière : 1) Un stand lors de la Fête des Associations au Havre : Nous avons pu discuter avec une centaine de personnes, une vingtaine ont donné leurs coordonnées; 1 suit un cours d'Esperanto.

2) Réception d'un voyageur du Dagestan, conférence avec projection 3) Soirée dans un café littéraire mais ne sont venus que les membres du groupe

Par contre, B.Blactot a assisté à une conférence d'un recteur d'université qui cherche à promouvoir un anglais moderne. L'expérimentation de cette pseudo-langue semble se faire sans beaucoup de publicité dans les médias !

Il serait souhaitable de trouver des actions d'ensemble qui pourraient avoir un meilleur impact que des actions isolées (Ex : campagnes de lettres à certains plénipotentiaires de l'ONU.) Il est grand temps d'utiliser les possibilités qu'offre le réseau des espérantistes pour promouvoir la langue. J'ai écrit ce texte en français car certains parmi nous qui ne possèdent pas vraiment la langue sont cependant tout prêts à dépenser beaucoup d'énergie à la promouvoir

ALAIN CHALIN

Note du Rédacteur: Il serait plus positif que les actions pour promouvoir l'Esperanto soient orchestrées par les grandes associations nationales (avec la participation des militants locaux, bien entendu). Les associations nationales seraient plus efficaces si elles avaient plus d'adhérents pour leur donner des idées et des moyens financiers !

GRAND QUEVILLY: La grupo kunvenis la 26an de Junio por festi studjarfinon kaj feriojn kaj ni kune vespermanĝis en restoracio.

La 3an de Julio, kelkaj membroj kuniĝis kaj diskutis kun Marie-Line kiu nun laboras en Insulo "La Réunion" kaj revenis en Normandion por pasigi feriojn. Ŝi parolis al ni pri vivo, kutimoj, laboro kaj turismo en tiu insulo tre malproksima.

Septembra NORMANDA BULTENO: Mi atendas artikolojn.

Jen sugesto : Ni komencis la serion "Kial kaj Kiel mi fariĝis esperantisto" Bonvolu daŭrigi tiun serion. Dankon !

HEROUVILLE : Irana Samideanino vizitis nian grupon, en Hérrouville.

Dank, al informo de Henri Masson, ni sukcesis, en junio, akcepti iranajn samideaninojn kadre de eta rondvojaĝo kunordigita de Marc Noulain, Vendôme (Parizo, Vendôme, Ste Foy la grande, Hérrouville).

Zhara havas du plenkreskajn infanojn. Ŝia edzo estas esperantisto, tre aktiva en la movado.

Zhara instruas ekonomion ĉe universitato en Balbosar apud maro Kaspjen. Vincennes universitato invitis ŝin prelegi en la angla (jes ja, ankaŭ en Irano, la angla lingvo trudis ŝin al la studentoj kaj profesoroj) pri la ekonomiaj konsekvencoj por Irano dum la lastaj lokaj militoj.

Ŝi estas bela kaj vigla virino, kiu fieras pri siaj popolo kaj kulturo.

Moderna, eturnigema, postulema, ribela kaj (plej efika armilo) humurplena estas ŝi.

Pro la fervojaj strikoj, ŝia normanda programo draste reduktiĝis. Tamen Zhara, tre scivolema, multe spertis dum ŝia restado : Bayeux, balenon en Luc, moskeon en Hérrouville !

Oni jam sciis ke la iranaj filmistoj estas fiere sendependaj, sed ni nun certas, ke ankaŭ la virinoj, kun aŭ sen kaptuko, havos pli kaj pli grandan rolon en tiu fora lando.

Denove, kiel ofte, esperanto helpis nin kompreni landon, kulturon, grandan civilizacion, ekster la tro oftaj kaj altrudiĝemaj kliŝoj.

Jean, membro de nia grupo diris : kaj nun kial ne viziti Zhara en Irano ?

Tre interesa propono, ĉu ne !?

Yves Nicolas

KIEL NOMI EN ESPERANTO NIAJN DIVERSRANGAJN PRAAVOJN ?

En la franca ni havas vortojn por indiki la gradon de parenceco inter individuo kaj liaj gepraavoj. Tiuj vortoj estas ĝenerale nekonataj ĉar malofte bezonataj. Ili estas indikitaj en la unua kolumno de la ĉi suba tabelo.

Franca vorto	Jura grado de parenceco laŭ artikoloj 735 ĝis 738 de la franca civila kodo	Ekzistanta esperanta vorto	Ebla esperanta solvo
Untel	-	luulo	-
Père	1-er degré	Patro	-
Grand père (ou aïeul)	2-ème degré	Avo	-
Arrière grand père (ou bisaïeul)	3-ème degré	Praavo	Triaranga prapatro
Arrière arrière GP (ou trisaïeul)	4-ème degré	Prapraavo (1)	Kvararanga prapatro
Quadrisaïeul	5-ème	-	Kvinaranga p.
Quinquaïeul	6-ème	-	Sesaranga p.
Sexaïeul	7-ème	-	Separanga p.
Septaïeul	8-ème	-	Okaranga p.
Octaïeul	9-ème	-	Naŭaranga p.
Ascendant au dixième degré	10-ème	-	Dekaranga p.
-	etc		ktp

Tiu tabelo montras ke la franca lingvo sin limigas je nomi la praavojn nur ĝis la naŭa grado, kaj eĉ, la tendenco estas je malriĉigo de la lingvo, ĉar se tiuj naŭ rangoj ja troviĝas en la « Larousse du XX-ème siècle » de 1954, la deksesvoluma « Grand Larousse » de 1985 haltas nun je « trisaïeul » !

La tabelo ankaŭ montras ke la esperantaj vortaroj provizas solvon nur ĝis la kvara grado. Cetere, tiu « prapraavo » ne estas tre kontentiga, eĉ se ĝi paŭzas la anglan respondantan « great great grandfather » ; tiu solvo estas senelirejo, ĉar oni ne povas daŭrigi, adaptante la nombron de la prefiksoj « pra » kun la nombro de generacioj. Ni devas trovi aliaĵon, pli rician, tuj kompreneblan kaj senliman.

Preterpasante ni rimarku la diferencon de unu unuo kiu ekzistas inter la solvo de la franca civila kodo (necesa por heredaĵoj) indikita en la dua kolumno, kaj la akademia vorto. Esperanto evitu tian hiaton. Mia opinio, ni devas sekvi la senliman solvon de la civila kodo. Tiel mi proponas la esprimojn de la kvara kolumno. Se vi konas aŭ trovas alian, mi petas, min transdonu.

Henri ROUSSEAU

La ville de notre rassemblement : JULLOUVILLE

Vous avez été à Jullouville qui, depuis 1972, regroupait Bouillon, Saint Michel des Loups, Carolles. (Carolles s'est dissocié depuis quelques années). Le nom de Jullouville a pour origine celui du promoteur, Armand JULLOU qui, à la fin du XIX^e siècle a créé au milieu des pins cette station balnéaire qui est maintenant la plus importante de la Manche.

Pour nous diriger vers la baie, nous avons emprunté le chemin qui mène à Carolles situé sur une abrupte falaise de granit.

La vue s'étend de Granville au nord jusqu'à Cancale à l'ouest. Puis Saint Jean le Thomas où le général Eisenhower résida dans la villa de Jacques de Lorges, père de Gabriel de Montgomery (chef du protestantisme normand), du 19 août au 29 septembre 1944.

Avant d'arriver à Genets, une petite route nous a permis de rejoindre la côte du Bec d'Andaine d'où partaient pour rejoindre le Mont Saint Michel les pèlerins venant de l'ouest et du nord de la France.

A mi-chemin entre le Bec d'Andaine et le Mont-Saint-Michel, Tombelaine a une base un peu plus longue que celle du Mont mais ne s'élève qu'à 40 mètres, deux fois moins que le Mont.

Au XII^e siècle, les moines du Mont y établirent un prieuré. Les Anglais s'emparèrent de l'île durant la guerre de cent ans et y bâtirent un château.

Au XVII^e siècle, elle appartenait au superintendant Nicolas Fouquet. Après sa disgrâce, Louis XIV fit raser tous les bâtiments. Il ne reste donc que quelques ruines au milieu des broussailles.

Le Mont Saint Michel se dresse dans le cadre fantastique d'une vaste baie où les marées sont les plus fortes d'Europe. Le rocher s'appelait à l'origine le mont Tombe mais en 708, l'Archange Saint Michel demanda en songe à Saint Aubert, évêque d'Avranches, d'y élever un sanctuaire en son honneur.

Transformé en prison sous la Révolution, le Mont Saint Michel gardera cette affectation jusqu'en 1863.

Vous n'avez pu malheureusement y rester qu'une petite heure mais nous espérons que cette sortie vous a plu (*malgraŭ pluvado*) et que peut-être vous reviendrez (*kun suno*) car nous croyons qu'on ne s'en lasse pas.

Christian LEVESQUE

Difficultés de l'Anglais:

Il y a maintenant une discussion académique à propos de l'existence ou de la non existence d'une règle pour l'accent en langue anglaise. L'opinion traditionnelle est qu'elle n'existe pas, et que l'on doit apprendre pour chaque mot particulier où se trouve l'accent.

René Pinhas, interprète de conférences écrit: "Au cours de congrès médicaux internationaux, l'anglais parlé par des orateurs français était souvent totalement incompréhensible pour les participants australiens, néo-zélandais ou pakistanais, parcequ'il n'y avait pas un seul, je dis bien un seul, accent tonique qui fût correctement placé. Alors que dire des malheureux Japonais, Suédois et autres Mexicains dont la langue maternelle n'est pas l'anglais! Les seuls membres de l'auditoire qui le comprenaient étaient les autres Français dans la salle!"

Extrait du Service de Presse de SAT-Amikaro

BAZIC-ENGLISH, EUROENGLISH aŭ ESPERANTO ?

En la rubriko "LE HAVRE" 2a paĝo de ĉi-Bulteno, estas aludate pri lanĉo de pseŭdo-lingvo kiu estas simpligita, reformita angla lingvo por internacia uzado. Simila projekto estis sensukcese probita antaŭ multaj jaroj.

Henri ROUSSEAU ricevis de "Père Marc" ĉi-suban artikolon. Sendube estas la sama afero.

The european union commissioners have announced that agreement has been reached to adopt english as the preferred language for european communications, rather than german, which was the other possibility.

As part of negotiations, Her Majesty Government conceded that English spelling had some room for improvement, and has accepted a five-year phased plan for what will be known as "Euroenglish".

In the first year, the letter "S" will be used instead of the soft "C". Certainly civil servants will receive this news with joy. Also the hard "C" will be replaced by "K". Not only will this clear up confusion, but typewriters can have one less letter.

In the second year there will be growing public enthusiasm when the troublesome "ph" will be replaced by "F". This will make words like "fotograf" 20% shorter.

In the third year, public acceptance of the new spelling can be expected to reach the stage where more complicated changes are possible. Government will encourage the removal of double letters, which have always been a deterrent to accurate spelling; also, it will agree that the horrible mess of silent "E"-s in the language is disgraceful, and they would go.

By the fourth year, people will be receptive to steps such as replacing "TH" by "Z", and "W" by "V".

During the fifth year the unnecessary "O" can be dropped from words containing "OU" and similar changes would be applied to other combinations of letters.

After the fifth year, we will have a really sensible written style. There will be no more troubles or difficulties and everyone will find it easy to understand each other. The dream will finally come true.

LANDA KONGRESO EN FRANCIO

La 2 ĉefaj Por-Esperanto asocioj en Francio ĉiujare organizas kongreson :

SAT-Amikaro dum Pasko 2003 en Cap d'Agde

Esperanto-France (UFE) en Grésillon dum Ĉieliro (Ascencion) . Neniu sendis al mi raporton pri kongreso de UFE, sed Suzanne donas al ni ĉi-sube, siajn impresojn pri SAT-Amikara kongreso:

Mi partoprenis la jaran SAT-Amikaran kongreson kiu okazis en Cap d'Agde de la 18a ĝis 22a de Aprilo. Proksimume 200 kongresanoj estis tie, ĉefe el Francio; sed ankaŭ venis belgaj, germanaj, svisaj kaj italaj samideanoj.

Ni loĝis en agrabla feria vilaĝo, en komfortaj ĉambroj malfermigantaj al ombroplenaj herbobedoj.

En la memserva restoracio, kongresantoj kaj feriantaj familioj manĝis, flanko ĉe flanko, Kelkaj el tiuj feriantoj estis tre interesataj kaj petis informojn pri tiu malbone konata lingvo. Krome, ĉiuj havis okazon aŭdi Esperanton pro tio ke la prezidanto de la OKK (Organiz-Kongres-Komitato) donis la informojn, fine de la manĝoj, esperante, kompreneble!

Post la akceptado kaj la unua tagmanĝo, pluraj ekskursoj estis proponataj, gvidataj de membroj de la OKK:

- ŝipopromenado sur la Suda Kanalo
- ŝipopromenado tra la haveno
- vizito de urbcentro de Agde kaj de muzeo pri regionaj tradicioj
- piedpromenado al Mont Saint Loup estingita vulkano, 111 metrojn alta

Fine de la posttagmezo, okazis 2 prelegoj : la unua pri venonta sociala forumo en Saint Denis, dum novembro; la dua titolita : " la diverseco de la kalendaroj en la mondo, fare de André Cherpillod.

Vespere, eblis aŭskulti prelegon de Georges Kersaudy pri : " Komunikado en plivastigata eŭropa komunumo"; ĝi okazis en bela salono en kongrespalaco de Cap d'Agde. Multaj esperantistoj ĉeestis por aŭdi la talentan oratoron ; venis ankaŭ neesperantistoj (eble 30) sed debato ne estis tre fruktodona.

Dimanĉe kaj lunde, estis tre malfacile fari sian horplanon pro tio ke oni deziris esti ĉie : ĉu sekvi kursojn (oni devis almeti seĝojn pro granda nombro da lernantoj) ; ĉu partopreni laborkunsidojn; ĉu aŭskulti prelegojn kies titoloj estis allogaj. Kiam nenio okazis, eblis iri al Libro-servo kun longegaj tabloj kovritaj de nenombreblaj libroj, revuoj, diskoj, vortaroj, ktp...

Dum la laborkunsidoj, oni multe debatis pri la agoj por disvolvi kaj konatigi Esperanton al la publiko :

- Partopreni al la Socia Eŭropa Forumo en Saint Denis
- Agi okaze de la Eŭropaj balotadoj en 2004 kaj kiamaniere ?

La distra programo estis bonvena post plenplenaj labortagoj. Michèle Freud ravis nin per belaj fabeloj. Ni tre ŝatis la kantiston JOMO kiu kantis en Esperanto sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj (li kantas en pli ol 20 lingvoj); li varmigus etoson en la salono.

La Teatra Trupo el Tuluzo talente interpretis teatraĵon de Labiche : "La krimo de la strato Lursin".

Ni plezure aŭskultis belgajn poemojn en franca kaj esperanta lingvoj

Pro tio ke ni tre bone laboris dum tri tagoj kaj por rekompenci nin, la OKK briligis la sunon dum mardo, tago de la tutaga ekskurso. Ni faris tre agrablan viziton en St Guilhem le Désert, en groto Clamouse. En eko-situo Méze, oni klarigis al ni la procezon de natura lagunado : kiel purigi la uzitajn akvojn per naturaj rimedoj

La rimarkinda laboro de Michel kaj Josée Lafosse kaj de la tuta grupo de la asocio " Les Cheminots Toulousains pour l'Espéranto" permesis ke tiu kongreso estis bonege organizita.

La preteco de ĉiuj respondeculoj, la riĉeco de la programo, la amika etoso lasos al mi bonan memoraĵon de mia restado

Mi esperas partopreni la venontan kongreson en La Roche sur Yon dum Pasko 2004

Suzanne Helbert
Grupo de Grand Quevilly.

Por Septembra Normanda Bulteno, mi tre deziras ricevi artikolojn pri:

Kongreso de Sen-nacieca Asocio Tutmonda en La Chaux de Fonds

UNIVERSALA KONGRESO en Göteborg

Kongreso de aliaj asocioj kaj diversaj aliaj aranĝoj (kiel Plouezek)

La Redaktoro

Pierre POTTIER malfermis la rubrikon " Kial kaj Kiel mi fariĝis Esperantisto" Aliaj kontribuis al tiu serio, sed mi atendas artikolojn de multaj aliaj homoj ĉar ĉiuj propravole ekstudis nian lingvon. Do, kuraĝon; ni atendas vian ateston.

Hodiaŭ, vi legos la tekston de Friedel Bues el Hanovro . Ĝi aperis en la bulteno de niaj geamikoj en ĝemelita regiono en malalta Saksio : "Esperanto in Niedersachsen"

KIAL DO ESPERANTON ?

Post la milito, mi estis tiom feliĉa reveni jam dum Aŭgusto 1945 hejmen ! Tiutempe, mi havis la aĝon de 22 jaroj kaj la firman konvinkon, ke ĉiuj homoj kaj ĉefe la junuloj havus la taskon ĉion fari por estonte eviti tiajn terurajn okazintaĵojn kiel la lastan militon.

De mia patro, kiu jam dum la 20-aj jaroj lernis kaj uzis Esperanton, mi aŭdis pri tiu lingvo kaj ĉe mi kreskis la konvinko ke ĝi povus esti taŭga ilo por solvi tiun taskon. Mi tiutempe jam aktivis en junularaj rondoj kaj nun ankoraŭ krome komencis lerni tiun lingvon.

Dum la nun tre malrapide komenciĝintaj provoj de malgrandaj internaciaj renkontiĝoj de la junular-movadoj, en kiuj mi partoprenis mi konstatis sufiĉe grandajn diferencojn inter la esperantistaj kaj ne-esperantistaj renkontiĝoj.

Ĉe la lastaj, mi konstatis, ke preskaŭ ĉiam la naciaj grupoj restis inter si, ĉefe dum la liberaj aranĝoj kiel ekzemple ekskursoj, manĝotempoj aŭ dum la liberaj vesperoj. Personaj kontaktoj inter si okazis nur tre malofte.

Tute kontraŭe estis dum la esperantistaj kunvenoj. Oni serĉis tiujn kontaktojn kaj tio ofte estis ankaŭ sukcesplena, kvankam tio ankaŭ estis iom streĉa. Sed ĉar ja ĉiu uzis lingvon, kiun li aŭ ŝi devis lerni antaŭe, kaj kiu ne estis ilia gepatra lingvo; la malfacilaĵoj por ĉiuj estis samaj. Eraroj ne tiom gravas kaj la kontaktoj komencis kreski kaj eĉ ankaŭ ripetiĝis post ioma tempo dum venontaj renkontiĝoj kaj ofte ili ankaŭ restis dum longa tempo.

Mi porekzemple ankoraŭ nun havas kontakton kun geamikoj, kiujn mi trovis dum la unuaj jaroj post la milito je tiaj kunvenoj.

Tiuj personaj kontaktoj ŝajnis kaj ŝajnas al mi tre gravaj ja eĉ necesaj, se oni celas la interamikiĝon de la popoloj. Ĉu tio efektiviĝos per unu aŭ per multe da lingvoj, tio estas demando de la kapableco kaj tempo de tiuj kiuj volas efektiviĝi tiun ideon.

Friedel BUES

LASTA OKAZINTAĴO :

Petro kaj Tereza Quillaud akceptis du junajn Norvegojn, Knut kaj lia amiko; ili kondukis ilin al Bernières (Calvados) kie grupo de Hérouville organizis piknikon. Partoprenis 2 aliaj eksterlandaj samideanoj : Oskar Utero de Miami kaj Olga Kuzmenko de St Peterburgo. La etoso estis vere internacia kun pli ol 20 ĉeestantoj kiuj tre parolis kaj bone amuziĝis...

NI RIDU

Eltiraĵoj de bulteno "Esperanto pyrénées"

La eta fakulo:

Instruisto : Jen estas la frazo : "Mia patro aĉetas teatron". Vi nun metigu ĉi tiun frazon en la tempojn pasintan, estantan kaj venontan !

Filo de teatra direktoro : Mia patro havis multe da mono... Mia patro aĉetas teatron... Mia patro bankrotos.

Bonŝance

Venu rapide Sinjoro Doktoro ; mia fileto englutis sian buŝharmonikon.

- Vidu, kia feliĉo, ke li ne ludis fortepianon !

Pri nasko:

Paĉjo kie vi naskiĝis ? _ en Danzig, karulo

Kaj kie naskiĝis Panjo ? _ en Londono

Kaj mi ? _ en Parizo

Kiel mirinde, ke ni ĉiuj renkontis unu la aliajn !